guĉi; sed en ĝi estas vivanta la spirito de l' aŭtoro de Esperanto.

U. H. A. predikas: I. La regformon de kunhelpado kaj solidareco en ĉiuj ordoj de la homa vivo; II. Nuligadon de la personismo, la sektanismo kaj la ekskluzivismo, kiel danĝeraj ismoj por la homaro; III. Reformon de la individuo kiel bazo de la reformo de la societo kaj sekve de la tuta homaro; IV. Fondon de la sola homa familio universala sub la moto: *Lumo kaj Amo.*

Tiuj-ĉi teorioj estis pritraktitaj en la IV Kunveno Internacia Boeke, pri kiu parolis ĵurnaloj *El Sol* kaj *La Libertad* kaj ili estis ankaŭ komentariitaj de la grava pensulo Norman Angell, kiu malfermis kaj fermis la laborojn de la Kunveno.

Homaranismo: idealo pri kiu ni parolas, estis en la cerbo kaj en la koro de la Majstro Zamenhof, kaj li ĝin reflektis en la poezio *La preĝo sub la verda standardo.*

Kiel fundamenta ŝtono de la Homaranismo, grandega konstruaĵo de Lumo kaj Amo, Zamenhof kreis la lingvon Esperanto.

Esperanto, do, ne estas nure internacia lingvo por la komerca interrilato je diversaj landoj; ĝi estas plie ama ŝnuro inter diverslandanoj. Ĉu tion ne scias ĉiuj esperantistoj sperte?

Esperantistoj! Se vi admiras la idealon de la Majstro Zamenhof kiam li kreis Esperanton; se vi volas honorigi lin sekvante lian laboron, aliĝu al U. H. A. Aliĝo estas senpaga.

* * *

Jam estas iaj centoj da Sekcioj kaj Filioj en la tuta mondo, kaj en Parizo estas starigita unu Eŭropa-Centra Oficejo por la propagando de U. H. A.

En Hispanio estas Filio el la Eŭropa-

sonalidad distinta: el sabio Maestro japonés Deguchí; pero en ella está latente el espíritu del autor del Esperanto.

A. U. A. H. predica: I. El régimen de cooperación y solidaridad en todos los órdenes de la vidà humana; II. Abolición de todo personalismo, sectarismo o exclusivismo, que tanto daño hacen a la humanidad; III. La reforma del individuo como base de la reforma de la sociedad y sucesivamente de la humanidad entera; IV. Constitución de la sola familia humana universal bajo la divisa *Luz y Amor.*

Estas teorías han sido ya sostenidas en la IV Conferencia Internacional Boeke, de la que se han ocupado los diarios *El Sol* y *La Libertad*, y han sido hábilmente comentadas por el célebre pensador Norman Angell, que abrió y cerró los trabajos de dicha Conferencia.

El Humanismo: este ideal que estamos explanando, vivía en el cerebro y en el corazón del Maestro Zamenhof, que lo reflejó en su composición *La preĝo sub la verda standardo.*

Como piedra angular del Humanismo, de este colosal edificio de la Luz y el Amor, creó Zamenhof el idioma Esperanto.

El Esperanto, pues, no es sólo un idioma internacional útil para estrechar los lazos comerciales de los distintos países; es, además, un vínculo de amor entre los hombres de nacionalidades distintas. ¿No lo sabemos todos los esperantistas por experiencia?

¡Esperantistas! Si admiráis el ideal que perseguía el Maestro Zamenhof al crear el Esperanto; si queréis honrarlo continuando su obra, afiliaos a la A. U. A. H. La afiliación es gratuita.

* * *

Existen ya varios cientos de Secciones y Filiales en todo el mundo, y en París hay establecida una Oficina Central Europea de Propaganda de A. U. A. H.

En España existe una Filial de la Ofi-

Centra Oficejo de U. H. A. starigita, provizore, en Hellin, Barbarroja, 3.

*Esperantistoj, aliĝu al U. H. A. per la Hispana Filio!!!*

## SCIIGOJ

*Grava konferencô pri Esperanto en Burgos.*—En nia oktobra numero ni sciigis al niaj legantoj, ke S-ro. Benigno de Luna, nia nelacigebla propagandisto, ekvojaĝis al Burgos por labori por nia afero.

Efektive, ni legis sur la Burgosa gazetaro—precipe en la ĉiutagaj gazetoj *El Castellano* kaj *Diario de Burgos* de la 24ª de novembro—longajn raportojn pri la laborado de nia amiko, kiu kronis ĝin per grava konferenco ĉe la Teatro Parisiana de la dirita ĉefurbo provinca.

Post elokventa saluto al siaj samurbanoj, S-ro. de Luna skizis tre trafe la esencon de esperantismo, ĝian historion kaj vivon de nia Majstro, Zamenhof; li priskribis la ecojn de Esperanto kaj la ekzistanta esperanta verkaro kaj gazetaro; li parolis pri niaj Kongresoj kaj pri la organizado loka, nacia kaj universala de nia movado, kaj fine, li entuziasmigis la aŭdantaron prezentante la internan ideon de l' esperantismo, varme proklamante ke ĝi estas vera amo frata, ĉar ĝi prenas sian forton el la Dia ordono, kaj tial celas alproksimigi inter si la homojn por akceli la pacan epokon kaj la regadon de frateco kaj justeco.

Nenecese estas diri, ke la parolisto estis treege aplaŭdita kaj kore manpremis kaj gratulis lin multenombraj ĉeestantoj, inter kiuj estis la Burgosa ĉefintelektularo.

cina Central Europea de A. U. A. H., que radica provisionalmente en Hellín, Barbarroja, 3.

*¡¡¡Esperantistas, afiliaos a A. U. A. H. dirigiéndoos a la Filial Española!!!*

## NOTICIAS

*Conferencia importante sobre Esperanto en Burgos.*—En nuestro número de octubre anunciamos a nuestros lectores que D. Benigno de Luna, nuestro incansable propagandista, emprendía su viaje a Burgos, para trabajar por la propaganda.

En efecto, hemos leído en la Prensa de Burgos—principalmente en los diarios *El Castellano* y *Diario de Burgos* del 24 de noviembre—extensas referencias de la labor de nuestro amigo, que la coronó con una importante conferencia en el Teatro Parisiana de dicha capital de provincia.

Después de un elocuente saludo a sus paisanos, el Sr. de Luna esbozó muy acertadamente la esencia del esperantismo, su historia y la vida de nuestro Maestro Zamenhof; describió las cualidades del Esperanto y la actual literatura y Prensa esperantista; habló de nuestros Congresos y de la organización local, nacional y mundial de nuestro movimiento, y finalmente, entusiasmó al auditorio, exponiéndole la interna idea del esperantismo, proclamando calurosamente que es un verdadero amor fraternal, puesto que toma su fuerza del precepto divino, y por eso tiende a la aproximación de los hombres entre sí para acelerar la época de paz y el reinado de la fraternidad y la justicia.

Innecesario es decir, que el orador fué muy aplaudido y estrecharon su mano y le felicitaron cordialmente muchos de los que asistieron, entre los que figuraba lo más selecto de la intelectualidad burgalesa.

Sekve de tiu konferenco estas anoncita esperanta kurso, gvidata de l' konata samideano S-ro. Duquesnay.

A consecuencia de esta conferencia se ha anunciado un curso de Esperanto, que dirigirá el conocido esperantista Sr. Duquesnay.

Koran gratulon al nia kara kunbatalanto S-ro. Luna pro lia kontentiga sukceso, ŝuldata nur al lia granda amo por nia idealo!

¡Cariñosa felicitación a nuestro querido correligionario Sr. de Luna por su halagüeño éxito, debido únicamente a su grande amor a nuestro ideal!

---

Niaj madridaj samideanoj sciigas al ni, ke denove ili kunvenas ĉiuvendrede, de la 7ª ĝis la 9ª vespere, ĉe Kafejo Lisboa, strato Mayor, nº 1, samkiel ili faris en antaŭaj jaroj. Tie ili havos la plezuron akcepti ĉiujn esperantistojn, ĉu hispanaj ĉu eksterlandaj, kiuj volos ilin honorigi per siaj vizitoj kaj partopreni je tiu vigla kaj agrabla konversacio, saturita de la plej pura bonhumoro, kiun ni plezure memoras esti ĝuintaj iafoje, kiam ni eventuale pasis tra la hispana ĉefurbo.

Tiuj kunvenoj estas sendependaj je tiuj, kiujn oficiale okazigas la Esperanto-Grupo Madrida kaj Hispana Esperanto-Asocio, ĉiumarde posttagmeze, ĉe la loĝejo de la Ruĝa Kruco, str. Sagasta, 10.

Nuestros *samideanos* de Madrid nos participan que de nuevo empiezan a reunirse todos los viernes, de 7 a 9 de la tarde, en el Café de Lisboa, calle Mayor, núm. 1, como lo hacían en años anteriores. Allí tendrán el gusto de recibir a cuantos esperantistas, españoles o extranjeros, quieran honrarles con sus visitas y tomar parte en aquella conversación animada y amena, saturada del más sano buen humor, que con placer recordamos haber disfrutado algunas veces, de paso por la capital española.

Estas reuniones son independientes de las que oficialmente celebra el Grupo Esperantista de Madrid y la Sociedad Española Esperantista, todos los martes por las tardes, en el domicilio de la Cruz Roja, Sagasta, 10.

---

Ĵaŭdon 13ªⁿ de l' kuranta monato estis la tago difinita por komenci esperantan kurson ĉe la Skolt-Societo Madrida nia fervora propagandisto S-ro. Benigno de Luna, kiu sendube sukcesos inter la Skolta junularo, kiel en aliaj rondoj.

El jueves, 13 del corriente mes, fué el día señalado para empezar un curso de Esperanto en el Centro de Exploradores de Madrid, nuestro fervoroso propagandista D. Benigno de Luna, que sin duda triunfará entre la juventud de Exploradores, lo mismo que en otros medios.

---

## NIA KONKURSO

En la lasta numero de *La Movado*, ĝia Direktoro publikigis belegan artikolon pri nia *Konkurso Valencia*. Ni tre dankas al kolego, ĉar per tiu artikolo, li altiris la atenton de lia legantaro, pri nia afero, laŭ montras la multaj verkoj senditaj de diversoj konkurspartoprenantoj.

## NUESTRO CONCURSO

En el último número de *La Movado*, su Director ha publicado un bellísimo artículo, acerca de nuestro *Concurso Valencia*. Quedamos muy agradecidos al colega, pues su artículo ha atraído la atención de sus lectores, sobre nuestro asunto, como lo demuestran los muchos trabajos remitidos por distintos concursantes.

# Bibliografio

*Kompleta Traktado pri la prepozicioj kaj pri la akuzativo,* per ekzemploj en Esperanto, de Alberto Mair, Fakinstruisto.—Vieno XVI, Hasnerstrasse, 103, en Aŭstrio.—Prezo, 1 : 2 ŝillingo.

Jen utilega verketo, kiu en sia 70-paĝa teksto enhavas plenan studon pri ĉiuj prepozicioj, kies rolon klarigas multenombraj ekzemploj. Plie ĝi pritraktas la akuzativon kaj adjektivojn kun prepozicioj, ĉio tre metode ordigita kaj koncize kaj trafe prezentita.

Precipe tiu verketo estas taŭga por la jam iom lertaj esperantistoj, kiuj deziras perfektigi sin en la sciado de la lingvo, ĉar por komencantoj estus teruriga kaj kapromрa verko.

Ni rekomendas ĝin varmege al ĉiuj profesoroj de Esperanto, kiuj sendube trovos en tiu libreto la bonan klarigon pri kelkaj dubaj gramatikaj kazoj.

---

*Unuiĝo de Ligilo U. S. S. R.*—Eldono de Profesia Unuiĝo de Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Radio de Rusujo.—Paris, 1926.—Prezo 1/6 dolaro.—Aĉetebla en la Administracio de *L' Interligilo de l' P. T. T.,* 54 rue Custine, Paris, 18.e, Francujo.

Lukse eldonita broŝuro 40-paĝa, multilustrita, pritraktante la organizadon kaj funkciadon de l' Sindikato starigita de tiaj profesiuloj en U. S. S. R. (Unio de Socialistaj Sovetaj Respublikoj). La gravecon de la enhavo montros la jena resumo de la pritraktataj aferoj: De eldoninto.—Antauparolo.—Konstrukci - principoj, konsisto, aniĝo, monrimedoj, strukturo, aparato de l' Sindikato.—Kolektiva kontrakto.—Laborpago.—Labortago.—Virinlaboro.— Forpermesoj. — Kiel oni prijuĝas la konfliktojn.—Sociala asekurado.—Sanatorioj.—Kasoj de reciprok-

# Bibliografía

*Tratado completo sobre las preposiciones y sobre el acusativo,* por medio de ejemplos en Esperanto, por Alberto Mair, Maestro.—Viena XVI, Hasnerstrasse, 103, en Austria.—Precio, 1 : 2 chelín.

He aquí una obrita utilísima, que en su texto de 70 páginas, contiene un estudio pleno sobre todas las preposiciones, cuyo uso aclaran numerosos ejemplos. Además, trata del acusativo y de los adjetivos con preposiciones, todo muy metódicamente ordenado y concisa y acertadamente tratado.

Sobre todo es a propósito esta obrita para los esperantistas ya algo expertos, que desean perfeccionarse en el conocimiento de la lengua, pues para los principiantes sería una obra pesada y terrorífica.

La recomendamos calurosamente a todos los profesores de Esperanto, que sin duda hallarán en este librito la justa solución sobre algunos casos gramaticales dudosos.

---

Liga de funcionarios de Correos, Telégrafos, Teléfonos y Radio, en Rusia.—París, 1926.—Precio, 1'25 pesetas.—De venta en la Admón. de *L' Interligilo de l' P. T. T.,* calle Custine, 54, París, 18.º, Francia.

Folleto lujosamente editado, de 40 páginas, con muchas ilustraciones, reseñando la organización y funcionamiento del Sindicato establecido por aquella clase de profesionales en U. S. S. R. (Unión de Soviéticas Repúblicas Socialistas). La importancia del contexto quedará de manifiesto con el siguiente resumen de los asuntos de que trata: Del editor.—Prólogo.—Principios constitutivos, formación, ingreso, medios de sostenimiento, estructura, constitución del Sindicato. — Contrato colectivo.—Pago de trabajo.—Horas laborables.—

helpado. — Senlaboreco. — Loĝeja demando.—Impostoj.—Kultur-kleriga laboro.—Rilato al Sindikat-movado de U. S. S. R.—La partopreno en la ŝtata laboro.—Reciprok-interrilatoj kun Popola Komisariejo de Poŝtoj kaj Telegrafoj.

---

*Novaj Amaj Poemoj*, de Jaume Grau Casas, L. K.—Aĉetebla ĉe la aŭtoro: Claris, 72, Barcelona. Prezo: 1 peseto aŭ ekvivalento en francaj frankoj.

En tiu nova poemlibreto—32-paĝa kun paperdikaj kovertoj — S-ro Grau montras sin vera poeto: li posedas altgrade la poezivivigan amsenton, la inspiron kaj la metrikan facilecon, tiamaniere, ke li same sukcesas en ĉiuj silabmezuraj formoj. Precipe li venkas ĉe la sonetoj kiuj estas lia specialaĵo, malgraŭ la ĉiekonata malfacileco, kiun entenas tiu versfarada verkaĵo.

Li uzas la plej diversajn poeziformojn kio sendube plibeligas la verkon, kaj tial ĝi devas esti tute permesita de la esperanta poeziarto, ĉar kiel diras en la antaŭparolo de la verketo la respektinda Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio, S-ro. Cart, al la aŭtoro: «Vi plene rajtas uzi en poezio la formon, kiu plej plaĉas al vi kaj al viaj legantoj. Via libereco pri ritmoj, rimoj, asonancoj, forigo de la rimo aŭ eĉ de la asonanco estas plena, se nur vi ne forgesas *(kaj tion vi ne forgesis)* ke la tonika akcento ludas en Esperanto grandan rolon kiel en itala, hispana, germana ktp. lingvoj (*ne* en la franca). La *sola* regulo en poezio estas *harmonio* (kaj tion vi ankaŭ ne forgesas)...»

La verketo estas bele eldonita. Tamen kelkaj preseraretoj enŝoviĝis en ĝin, rimarkinde unu el ili, kiu fariĝas grava

Trabajo de la mujer.—Permisos.—Cómo se resuelven los conflictos.—Seguro social. — Sanatorios. — Cajas de auxilios mutuos.—Falta de trabajo.—Alquileres. —Impuestos.—Cultura e instrucción.—Movimiento sindical de U. S. S. R.—La participación en el trabajo del Estado. —Relaciones recíprocas con la Comisaría Popular de Correos y Telégrafos.

---

*Novaj Amaj Poemoj* (Nuevos poemas de amor), por Jaime Grau Casas, L. K.—Puede adquirirse en casa del autor: Claris, 72, Barcelona. Precio: 1 peseta o su equivalente en francos franceses.

En este libro de versos—de 32 páginas con cubiertas de papel grueso—el Sr. Grau se muestra como verdadero poeta: posee en alto grado el sentimiento del amor, alma de la poesía, la inspiración y la facilidad métrica, de tal modo, que maneja igualmente bien los diferentes metros. Sobre todo, culmina en los sonetos, que son su especialidad, a pesar de la conocida dificultad que encierra esta clase de composición.

Emplea las más diversas formas poéticas, lo que indudablemente embellece la obra, y por eso debe ser ampliamente permitido en el arte poético esperantista, pues como dice en el prológo de la obrita el respetable Presidente del Comité Lingüístico y de la Academia, señor Cart, al autor: «Usted tiene pleno derecho a usar en poesía la forma que más les plazca a usted y a sus lectores. Su libertad de ritmos, rimas, asonancias, supresión de la rima o hasta de la asonancia es completa, no olvidando tan sólo *(y esto no lo olvida usted)* que el acento tónico desempeña en Esperanto un gran papel, como en italiano, español, alemán, etc. (*no* en francés). La *única* regla en poesía es *harmonía* (y esto también usted no lo olvida)...»

La obrita está bien editada. Sin embargo, algunas pequeñas erratas se han deslizado en ella, con notoriedad una,

pro apostrofado—ĉiam malbela ĉe substantivo meze de verso—de vorto, kiu donas por oksilaba verso tiun ĉi: «la tim' plenigas vin,» (paĝo 7[a]), mallongigitan kaŭze de l' apostrofo malprava. Ĝi meritas tujan korekton, por la baldaŭe vendotaj ekzempleroj, kiuj nepre estos multaj, konsiderante la meriton de la verko, pro kiu ni sendas al la lerta kaj produktema samideano S-ro. Grau niajn plej sincerajn bondezirojn.

que resulta importante a causa del apóstrofo—siempre feo en un sustantivo en medio de verso—de una palabra, que da para un verso octosílabo el siguiente: «la tim' plenigas vin,» (página 7), corto por culpa del erróneo apóstrofo. Ello merece inmediata corrección en los ejemplares que han de venderse pronto, que precisamente serán muchos, dado el mérito de la obra, por la que enviamos al culto y fecundo *samideano* Sr. Grau nuestros más sinceros parabienes.

---

*Oficiala Klasika Libro* de Esperanto.—Itala Hispana kaj Portugala partoj. Publikigaĵo de la Esperantista Akademio.—Prezo: 3'60 francaj frankoj (sendkosto plie)—Ĉe Esperantista Centra Librejo, 51. rue de Clichy, Paris (9[e]).

Jen verko longtempe atendata de ĉiu esperantisto el la aluditaj landoj, kie mankas moderna vortaro esperanta, enhavanta ĉiujn novajn vortojn akceptitajn de la Akademio en la lastaj dek jaroj.

Ĝia enhavo estas la jena: 16-regula Gramatiko de D-ro. Zamenhof kun kelkaj notoj.—1[a] parto, kun ĉiuj nunaj Oficialaj radikoj de Esperanto tradukitaj en la diritaj tri lingvoj (la tradukinto de la hispana parto estis S-ro. Inglada), enhavas pli ol 3.000 vortojn, ne enhavante tiujn, kiuj estas sufiĉe internaciaj por ne bezoni tradukon.—2[a] parto, kun la internaciaj radikoj, kiuj, eĉ estante netradukitaj, estas ĝenerale kompreneblaj por eŭroplingvanoj, konsistas el ĉirkaŭ 1.500 vortoj.—3[a] parto kun la radikoj el la 2[a], kiuj ne troviĝas en la Vortaro de *Kabe*, kaj aldono kun la fundamentaj vortoj portantaj la sufikson *-um*. Plie listo de ĉefaj landnomoj, esperanta verkaro, k. c.

---

*Oficiala Klasika Libro* de Esperanto.—Partes italiana, española y portuguesa. Publicación de la Academia Esperantista.—Precio: 3'60 francos franceses, mas los gastos de envío (total 1'25 pesetas).—En la Librería Central Esperantista, rue de Clichy, 51, París (9[e]).

He aquí una obra hace mucho tiempo anhelada de los esperantistas de los países aludidos, donde falta un diccionario moderno de Esperanto, que contenga todas las palabras nuevas admitidas por la Academia durante los diez últimos años.

Su contenido es el siguiente: Las 16 reglas de la Gramática del Dr. Zamenhof con algunas notas.—1.[a] parte, con todas las raíces oficiales que existen actualmente en Esperanto, traducidas en dichas tres lenguas (el traductor de la parte española ha sido el Sr. Inglada), que contiene más de 3.000 palabras, no estando comprendidas aquellas que son bastante internacionales para no necesitar traducción.—2.[a] parte, con las raíces internacionales que, aun no estando traducidas, son generalmente comprensibles para los europeos, constando de cerca de 1.500 palabras.—3.[a] parte, con las raíces de la 2.[a], que no se hallan en el Diccionario de *Kabe*, terminando con listas de palabras fundamentales que llevan el sufijo *-um*, principales nombres de países, colección de obras en esperanto, etc.

Ĉio estas entenata en poŝformata libreto 128-paĝa, kiun nepre devas posedi ĉiu esperantisto, mendante ĝin ĉe la Centra Librejo rekte aŭ ĉe la hispanaj librovendejoj aŭ esperantistaj organizaĵoj.

Todo está contenido en un libro de bolsillo de 128 páginas, que es indispensable lo posea todo esperantista, encargándolo directamente a la Librería Central o a las librerías españolas u organismos esperantistas.

## HISPANAJ POPOLAJ KANTOJ

Vi amis, poste forgesis
kaj fine reamis min;
tiom da ŝanĝoj vi faris
ke mi eĉ malamis vin.

Se vi iras en marbordon
demandu pri mi la maron,
ĉar mi por vi mendis kison
kiu iris en l' ondaron.

Dum mia koro batados
en mia brusto pasia,
vi estos mia reganto
kaj mi la regato via.

Opinias geamantoj,
sed malprave opinias,
ke neniu vidas ilin,
ĉiuj, tamen, ilin vidas.

*Tradukis* A. P. A.

## CANTOS POPULARES ESPAÑOLES

Me quisiste, me olvidaste,
y me volviste a querer;
tantas mudanzas hiciste
que te llegué a aborrecer.

Si acaso vas a la playa
pregunta por mí a la mar,
pues para ti encargué un beso
que a las olas fué a parar.

Mientras mi corazón lata
en mi pecho apasionado,
tú serás mi dominante,
yo seré tu dominado.

Todos los enamorados
piensan, y no piensan bien,
piensan que nadie los mira
y todo el mundo los ve.

# AVISO

Por haber sido trasladado a Valladolid el Tesorero de la Sociedad Esperantista Española, Capitán de Artillería D. Luis Flórez, ha sido elegido nuevo Tesorero D. Pelayo Moreno Ferrer, que vive en la calle de Pontejos, 1, 2.º (Madrid), a quien en lo sucesivo debe enviarse todo el dinero que se refiera a suscripciones, pagos, cobros, donativos y demás de H. E. A.; la cuota del presente año es de 6'50 pesetas, con derecho a la *Membrokarto* que recogerán cuando lo estimen conveniente.—*El Secretario*, MARIANO MOJADO.

TIPOGRAFIA MODERNA, A C. DE M. GIMENO, PRIMADO REIG (antes Avellanas), 9, VALENCIA

# ASOCIACIÓN UNIVERSAL ESPERANTISTA

**Oficina Central: 12, Boulevard du Théâtre, Ginebra (Suiza)**

*La Asociación Universal Esperantista tiene por* objeto:

Difundir el uso de la lengua internacional auxiliar Esperanto.

Fomentar toda clase de relaciones morales y materiales entre los hombres sin distinción de raza, nacionalidad, religión o lengua.

Crear servicios internacionales para uso de todos los hombres, cuyos intereses intelectuales o materiales traspasan los límites de su nacionalidad o el territorio de su idióma.

Acrecentar entre sus miembros un fuerte lazo de solidaridad y desarrollar entre ellos el conocimiento de los pueblos extranjeros.

La Asociación es neutral en asuntos de religión, nacionalidad o política.

*La Asociación Universal Esperantista* consiste:

En siete mil miembros de diversos países.

En 1.200 Delegados y Vicedelegados en las principales localidades, quienes contestan a los informes que les piden los miembros y les ayudan con ocasión de sus viajes.

En un Comité, elegido por los Delegados, en una Oficina Central, en una organización territorial, etc.

*La Asociación Universal Esperantista* trabaja:

Por construir un centro de acción esperantista bien organizado y fuerte. En consideración a que una organización internacional es necesaria a una lengua internacional, el último Congreso concedió oficialidad a la U. E. A. considerándola como la organización mundial de los esperantistas individuales.

Para facilitar a sus miembros el uso práctico del idioma y favorecer la correspondencia esperantista, el turismo, las relaciones comerciales, intercambio de sellos, etc.

Para hacer conocer el valor de nuestra lengua en las oficinas entre estados, grandes asociaciones internacionales, etc. El éxito de estas gestiones depende en mucho del número de personas en cuyo nombre tenga derecho a hablar la Asociación.

*La Asociación Universal Esperantista* entrega:

A los Miembros: La Carta de socio y un anuario de 250 páginas, con las direcciones de los Delegados, grupos esperantistas, revistas, organizaciones, con noticias sobre relaciones internacionales, etc. Todo miembro que desee corresponder o establecer intercambio, tiene derecho a que se imprima dos veces su dirección en la revista *Esperanto* o especial suplemento.

A los Miembros Suscritores: La revista *Esperanto,* principal órgano internacional de los esperantistas, con artículos literarios, científicos, técnicos y exactos informes sobre el movimiento.

A los Miembros-Protectores: Con los impresos anteriores, un premio consistente en valiosas obras literarias a elección entre las tres remesas siguientes:

1.ª Obras del Dr. Zamenhof (ocho volúmenes de traducciones clásicas).

2.ª Biblioteca Internacional Esperantista (32 pequeños volúmenes de literatura internacional; forma manual de bolsillo).

3.ª «El Parnaso de los Pueblos» (poesías de 30 lenguas, magistralmente traducidas por Antonio Gravowski).

*La Asociación Universal Esperantista* solicita:

Una cuota anual de 5 frs. por Miembro, de 12'50 frs. por Miembro-Subscriptor y de 25 frs. por Miembro-Protector (precio especial para españoles: 6, 15, 35 pesetas, respectivamente).

# Internacia Centra Komitato de la esperanto-movado

**Comité Central Internacional del movimiento esperantista**

**12, Boulevard du Théâtre, Genève (Ginebra) Svislando (Suiza)**

Lleva la suprema dirección de la propaganda Internacional de Esperanto, de acuerdo con K. R. y U. E. A.

*Prezidanto:* D-ro. Edmond Privat, 12, Boulevard du Théâtre, Genève.

*Instruado & Statistiko:* Prof. D-ro. Dietterle, Seumestrasse, 10, Leipzig-W. 31.

*Financo Fako:* D-ro. A. Stromboli, Lungarno Regio, 17, Pisa.

*Gazetaro* (Prensa): Rudolf Hromada, Socharská, 333, Praha VII.

*Teknikaj Fakoj* (Secciones técnicas): M. Rollet de L' Isle, 35, rue Sommerard, París, V.

*Socia Fako* (Sección social): Julia C. Isbrücker, Oostduinlaan, 32, s' Gravenhage.

*Konsilantoj:* D-ro. Won Kenn, Kanton, China.—E. Legrand, Montevideo, W. M. Page, Edinburgh.

**Administrado**

*Ĝenerala Sekretario:* Rob. Kreuz, Genève.

*Sekretario:* Andreo Ĉe, Genève.

*Helpsekretariino:* Ida Brélaz.

## HISPANA ESPERANTO-ASOCIO

**(Asociación Esperantista Española)**

*Calle de Sagasta, núm. 10, Cruz Roja, Madrid*

*Presidente:* D. José Perogordo, calle de los Santos, 2, Madrid.

*Secretario:* D. Mariano Mojado, Abascal, 13, pral., A. Madrid.

*Tesorero:* D. Pelayo Moreno Ferrer, calle de Pontejos, núm. 1, 2.°, Madrid.

## FEDERACIÓN ESPERANTISTA LEVANTINA

*Calle del Mar, núm. 23, Ateneo, Valencia.*